# Raporto pri nia partopreno en la 22-a Internacia semajno en Salou

*Teksto: Marcel Delforge - Fotoj: Michèle Villers - Enpaĝiĝo Hubert De Meyere*

**APUD LA URBO TARRAGONA, DE LA 4-A GIS LA 11-A DE OKTOBRO 2014, KUN PLI OL 140 PARTOPRENANTOJ, OKAZIS TIAN KUTIMAN JARAN ARANGON.**







Estis sufiĉe multaj belgoj, inter ili grupo el Oostende, Bruselo, kaj Karlorego ( Charleroi); en tute 22 homoj el kiuj kelkaj komencantoj kaj neesperantistoj. Ankaŭ multaj francoj, pro la proksimeco kun Hispanio.




**La unuan tagon, la urbestro de Salou, S-ro Pere Granados Carrillo bonvenigis kaj invitis nin gui la centron de turismo la plej influa de la Katalunia marbordo. Ge-Soj Serrano-Perez kaj aliaj ĉefaj aktivuloj de la aranĝo, akceptis nin kun granda afableco.**






**Kurso de Esperanto far Rodica Todor.**

TEMO: "ESPERANTO PONTO INTER KULTUROJ EN MULTKULTURA, PLURETNA SOCIO.

METODO: FLAM ANALIZO (vidu bildon de la tabulo)

Detaloj en raporto rete elŝutebla el nia retejo.






**Komencantoj ricevis elementan kurson de S-ro Saladin, kiu ankaŭ klarigis pri la stato de la internacia peticio : Eo oficiala lingvo en EU TUJ!**



**S-ro J.Carlo Fighiera prelegis pri verko de Puŝkin « La neĝstormo ».** Kiel kutime, estis brila prezento : perfekta lingvo, ege klara elparolado, amuzaj detaloj, tute taŭga daŭro, ktp.

Michèle videoregistris la prelegon (3min15).

[Videbla kaj aŭdebla per Youtube]

Marcel Delforge parolis pri vojaĝoj tra la mondo dank'al Esperanto. Li bone resumis sian longan karieron, ne nur la profesian sed ankaŭ esperantistan. Li ilustris per bildoj kaj tekstoj tri vojaĝoj: Rusio, Rumanio kaj la pasinta « Semajno en Lloret de Mar » . [La dosierojn estos ankaŭ elŝuteblaj el la retejo de APE.]




Johano Petik, Hungaro, donis ideojn por la disvastigo de nia lingvo, kaj ge-soj Aldis Buss / Jùrate Buisiene el Latvio montris bildojn de antaŭaj Kongresoj en Baltaj Landoj.






Estis interesaj ekskursoj al Tarragone, al "Merravelles "groto kun stalagmitoj/stalagtitoj, apud vilaĝo Benifallet. Ankaŭ memorinda estis nia ŝipvojaĝo sur rivero "Ebre".

**Se oni aldonas al tiu riĉa programo, du interkonaj vesperoj kun trinkaĵoj de ĉampano, de "cremat" (speco de rumo) kaj abunda restoracio, kaj luksa hotelo, centmetrojn de la marbordo, vere estis sukcesa aranĝo. Jeanne Draime ege sukcese gvidis improvizitan atelieron por fari paperkolierojn.**

**DANKON AL LA ORGANIZANTOJ !**




**Iun vesperon, ni aŭdis faman operon "Il Trovatore", alian folkloran ensemblon "Montjuit".**